# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

http://www.iespana.es/esperanto/k60.htm

Trovu nian tutan kolekton ene de via magazino!


Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTOJ (HALE)

Bela Strato Primado
Reĉ, sidejo de HEF62

Televido: ĉu monda danĝero..?

Nro 59a Julio/septembro 2003

De decembro de 1988 al oktobro de 2003!

Nro 60a Oktobro/decembro 2003

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)


*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3°D,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Av. Murcia, 7-3° A*
*30110 Cabezo de Torres (Murcia)*
*Libroservo:* ***vakas.***
*Kasisto:* ***vakas***
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras Jiménez.**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* ***konto*** *n°* ***2100-4455-71-0200055454.*** *Sen aldona kosto.* La abono kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Monato***, de Stefan Maul,
3 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
4 ***Sennaciulo***, de Kreŝimir Barkoviĉ,
5 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
6 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
7 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
8 ***Litova Stelo***, de Petras Ĉielauskas,
9 ***Liberecana Ligilo***, de Jakvo Schram,
10 ***Laŭte!***, de C. Baudé,
11 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
12 ***Juna Penso***, de Vinko Markov,
13 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
14 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi
15 ***La verda proleto***, de komitato.
Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.



**Kovrilo**: La unua kaj la lasta ***Kajeroj***.

## Enhavo

Redaktore .................... 3
Informoj de la prezidanto .................... 4
La 11-a Kultura Semajno de Katalunio .................... 4
La 76-a Kongreso de SAT en Ŝodefon' .................... 5
Aventurplena aŭtobiografio de ĝisosta SATano ....... 7
Bonvolu ridi..., sed ne tro! .................... 9
Gazetoteko Lanti kaj ***Boletín*** .................... 10
Datrevene .................... 13
Televido: ĉu danĝero aŭ telekomunikilo? .................... 16
La mitoj de la Intercivitana Milito .................... 21
Nova libro en Esperanto .................... 22
Statuto de SAT: la Konvencio de Gotemburgo...... 23
La Kongreso Virtuala de HALE .................... 24

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Redaktore

Mi devas pardonpeti pro tio, ke la Kataluna Kultura Semajno ne okazas nun en Kambrils, kiel dirite en nia lasta bulteno, sed en Sankta Susana. Mi esperas, ke tiu semajno estas tiom sukcesa, kiel kutime.

Je la antaŭfina paĝo de nia magazino ni publikigas la unuan parton de la ***Konvencio de Gotemburgo***, kiu reguligas la rilaton de LEAoj kaj SAT. La venontan numeron ni finos publikigi ĝin, kaj prikomentos nian regularon, lume de la lastaj gravaj eventoj rilate al SAT, HALE kaj aliaj homoj de la lastaj du jaroj.



Je la 21-a jarcento ni atestas renoviĝo de historio kaj reserĉo, kiuj eksmodigas la ideojn, kiujn oni havis ĝis nun pri nia pasinto. Historiistoj jam sukcesis preni en siaj manoj dokumentojn ĵuse malklasigitajn kiel *sekretajn*, do ili rakontas al ni novajn aspektojn de la grandaj konfliktoj de la 20-a jarcento. Lastan numeron ni recenzis la libron de hispana Vidal, ***La ĉokoj[1] de Madrido***, kaj nun ni recenzas la apartan libron ***La mitoj de la Intercivitana Milito***. Pri tiu lasta libro estis polemiko en gravaj ĵurnaloj hispanaj, ĉar la aŭtoro, Pío Moa, estas ekskomunisto kaj eksano de terorista asocio GRAPO. Post tiuj junaj jaroj, li iĝis historiisto, kaj ŝanĝis sian intelektan sintenon, laŭ li pro alveno de informo, kiun li ne havis, kiam li estis junulo. Interese estas, ke aliaj historiistoj, kiel Ĥavjer Tusel', ne atakis la teoriojn aŭ eltirojn de Moa, sed Moan mem. Tio povas esti normala (tamen ne inteligenta) se temas pri subtenantoj de futbala teamo aŭ politika partio, sed ne pri seriozaj, sciencaj historiistoj. Fakte Pío Moa devis denunci la periodaĵon ***El País***, ĉar tie Tusel' atakis lin, sed oni ne permesis publikigi la respondojn de Pío Moa.

Kiam mi redaktas ĉi tiun numeron, venas al mi la novaĵon, ke dum la pasinta Kongreso de SAT en Ŝodefon' (Svizio), oni parolis abunde kaj malestime pri nia asocio, nome *kamaradoj* Jakvo Ŝram kaj Marteno Bustín, trudis sian vidpunktojn pri HALE, sen averti al ni antaŭe, aŭ inviti nin iri tien aŭ sendi komunikon oficialan por diri duan opinion pri la gravaj akuzoj diritaj kontraŭ ni, tiel ke bazaj anoj de SAT povu havi propran opinion pri la afero. Estas bizare, ke homoj malŝatu asocion tiom multe, ke ili foriru de ĝi kaj fondu novan, kaj de tiu nova asocio, ili fiparolu pri sia antikva asocio cele al okupi la postenon, kiun la unua asocio havis, anstataŭ debati kaj modifi ĝin de interne, agadi kaj kandidatiĝi al estraro, tiel, kiel ni proponis al ili. La estraro de HALE atendas komunikon de la estraro de SAT pri tiuj aferoj rilatantaj al ni, kaj la peto komenti ilin, por ke la anoj de SAT havu justan ideon pri tio, kio okazis. Kelkaj SATanoj, tamen, jam skribis al ni, ke ili subtenas kaj kuraĝigas nin en nia kutima tasko. Dankon al ili.

Sed nun mi nur deziras al ci, leganto, ke ci ĝuu nian magazinon, kiun per zorgo kaj amo ni pretigis, por ke ci legu kaj praktiku Esperanton, kaj —se eblas— kleriĝu iomete.

[1]Erare la artikolo titoliĝis *Ĉekoj*, sed vere oni diru *ĉokoj*, ĉar temas pri komencliteroj, kiuj esperante finas ĉiam per -o, ne per -e aŭ -a, kiel en la hispana.

# Informoj de la prezidanto

Estimataj geamikoj kaj gehaleanoj!



denove mi parolas pri la virtuala kongreso, la Tria Kongreso de Hale. La estraro aprobis mian planon pri la kongreso, post interna debato, kaj ĝi komencos en decembro.

Ni proponos paroli pri la progreso, kaj tiun prelegon mi prezentos dum la kongreso, la redaktoro prezentos la temon ***Kajero el la sudo****, kiel organo de liberpenso*, José Pina defendos ke ni akceptu monon el reklamado en la bulteno, kaj ankaŭ ni devas interkonsenti pri kiu estas la sinteno de HALE rilate al globisma mondo.

Ni havas iluzion pri tiu ĉi projekto de la virtuala kongreso, kiu estas la unua tia, kian oni faras ĉu interne, ĉu ekstere de la Esperanto movado.

Ni ne kontraŭstaras *nevirtualan kongreson*, sed ni plenumi veran kongreson virtualan estas nun nia defio, kaj cele al tio, ni petas vian kunlaboron kaj partoprenon, anoj kaj ne anoj de HALE. Globismo kaj virtualigo povas havi ja multe da problemoj kaj malvirtoj, sed estas nepretervidebla afero: ni ĉiu havas lokon en ĝi, ni estas kondamnitaj interkompreni unu la aliajn. Ni faru rapide, dece, civilize, kaj fratece. Se ni deziras pli bonan mondon ol tiu, kiun ni vidas ĉiutage, tio estas...

Fratece kaj kamaradece,

*Johano Antono Cabezos Martínez*

## *La Kultura Semajno de Katalunio*

**4-a al 11-a de Oktobro de 2003 en Sankta Susana.**



Devas mi pardonpeti pro tio, ke mi erare diris la lastan numeron, ke la 11-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo estos en Kambrils, ĉar ĝi vere okazos en la urbo Sankta Susana, de la 4-a al la 11-a de oktobro de 2003. Sankta Susana estas je 49 kilometroj norden de Barselono, kaj la kunvenejo estas en Hotelo Mercury, je 20 metroj de la stacidomo. La aliĝo kostas 24 eŭrojn, kaj manĝado kaj dormado en dulita ĉambro kostas 30 eŭrojn tage, kaj en unulita ĉambro, 36 eŭrojn.

La *semajno* havas kvar partojn: prelegojn, ekskursojn, distraĵojn, kaj samideanan etoson. Minimume ĉiam estas kvar prelegojn, plej malsimilaj unu al la aliaj kiel eble, kaj ili povas temi pri Esperanto aŭ alia afero de ĉiutaga vivo nia. Kaj la kadro de tiu aranĝo estas neforgesebla kaj nemankebla mezpunkto de Mediteraneo!

Tiun ĉi renkonto okazas ĉiun oktobron. Se vi povas ĉeesti, ĝuu venontjare etoson kulturan kaj amikan esperante.

# La 76ª Kongreso de SAT en Ŝodefon'

Karaj ge-kdoj, jen finiĝis la 76-a SAT-Kongreso okazinta ne Ĉaŭdefono Svislando. Evidente vi ricevos kompletan raporton en nia «Sennaciulo». Grava por mi estis ke la Kongreso subtenas la decidon de la P.K. partopreni la Eŭropan Socialan Forumon, okazonte en St-Denis inter la 12-a kaj 16-a de novembro. La homoj, kiuj volas kunagadi aŭ kunlabori (ankaŭ ne -SAT-membroj) anoncu sin, al mi aŭ rekte al Vincento Charlot aŭ Rene Ballaguy. Ĉiuj proponoj bonvenas tiujn, kiuj povus helpi ties agadon.



Ankaŭ grava estas ke la LEA-Komitato unuanime decidis akcepti SATEH kiel LEA-o en Hispanio. La nova LEA-o estas petata indiki aŭ elekti inter si reprezentanton por la Ĝenerala Konsilantaro de SAT. Estas memevidente ke la reprezentanto estas subtenanto de SAT kaj volas agadi favore al plikreskigo de nia asocio. Ke ĉi tiu persono estas mem membro de SAT estas la deziro de la plejmulto de la partoprenantoj de nia Kongreso. Certe tio ne estas problemo por SATEH kie jam nun la plejmulto el la membroj estas SAT-anoj. Plej verŝajne la decido de nia LEA-komitato forte influiĝis de la ĝis nun jam farita laboro de SATEH favore al SAT. En la LEA-Komitato partoprenis reprezentantoj de LEA/G, SLEA, SATEB, SAT-Amikaro, SATEH, de la nederlandlingva regiono. Mankis anoj de PREM (pro viza kialo, do certe ne pro malintereso), kaj HALE.

Interesa estis la vizito de la prezidanto de la svisa komunista partio al la kunsido de la Komunista Frakcio de SAT. Li kun granda intereso aŭskultis al la diskutoj, klare respondis al la demandoj faritaj, kaj li promesis informi la svizajn k-dojn pri la ekzisto kaj uzado de Esperanto en SAT. E-ge interesis lin nia maldekstra, progresema batalo en la sino de SAT. Li montris sian estimon, ke SAT kvankam multotendenca, kapablis unuigi la diversajn maldekstrajn fortojn al kunlaborado. Mi pensas, ke ni povas diri, ke SAT estas ekzemplo pri kunagado de malsamaj, tamen progresemaj tendencoj kaj grupoj sur unu flago. La anoj (plejparto) de Liberecana Frakcio profitis la okazon viziti «Espace Noir» (nigran spacon), la liberecana / anarkiista kooperativo en St Imier, iam la urbo kie oni subskribis gravan anarkiistan tekston. Ankaŭ tie, ni SAT-membroj povis montri nian laboremon kaj pretecon al kunlaboro kun aliaj tendencoj. Ni povis montri ke SAT ne estas aro de fanatikuloj unutendencaj sed agantoj kun malferma spirito. Okulfrapis en la granda belega domo de la kompanoj de St-Imier la bela kinosalono, aŭditorio, riĉega biblioteko, la ekspozicia spaco kaj trinkejo.

Ankaŭ la ekologiistoj havis sian kunsidon kaj prezentis interesan deklaron kiu aperos certe en nia ***Sennaciulo***. Sennaciista Frakcio kunvenis kaj pridiskutis kaj plifajnigis la bazan tekston de la Frakcio. Plian informon vi trovos poste sur paĝo de la Frakcio kaj en ***Sennaciulo***. Prezidantoj de la laborkunsidoj estis Grazien Opulskiene, Stan Keable, Michel Duc Goninaz kaj Vincento Charlot. La nova Konflikt-Komisiono konsistas el Djemil Kessous, Tahira Masako kaj Gary Mickle kiel sekretario. Gary Mickle iĝis laŭ statute la nova sekretario de la Ĝenerala Konsilantaro. En ĉiu kunsido partoprenis ano de la Plenum-Komitato kiel obzervanto, sed mi povas diri ke neniu k-do havis la ideon, ke li devas plenumi taskon, sed havis la avantaĝon partopreni interesan kunsidon. Evidente ne eblas plendi pri la peza kaj plenplena programo, sed ne eblis partopreni (bedaŭrindege) al ĉiuj kunsidoj (sama horo sama tago).

La 76-a SAT Kongreso finis kun kantado de «la internacio» kaj la «SAT-Himno».K-do Petro Chrdle montris kun belaj bildoj la vojon al la 77-a SAT Kongreso okazonte en 2004 en Bratislavo Slovakio. Jen tre modesta absolute ne plena raporteto de nia SAT-Kongreso. Preskaŭ mi volis diri, ke de lundo la 21-a de julio Kreŝo denove laboris, sed mi tiel ege perfortus la veron. Devas esti ke ek de morgaŭ Kreŝo denove laboras en SAT-sidejo en Parizo. Permesu ke mi esprimu mian grandegan admiron, pri tio, kion nia k-do jam dum jaroj faras por SAT. Pripensu pri ĝi kiam li petos viajn helpon kaj subtenon.

Plej kamarade via

*Jakvo*

Venas de paĝo 22-a

La tri komedioj enhavataj en ĉi-tiu eldono sub la epigrafo *Intrigo-Teatro*, konsistigas ekzemplon de la plej bonaĵus aperinta teatro tiu-tipa. La lerte disvolvita intrigo de tiuj komedioj montriĝas nur kiel drama kanvazo permesanta al Ruiz Negre emfazi pri la kruelaj aspektoj manifestantaj la homan krizon (jen ekzistencian, jen socian) de liaj personoj. Tiuj intrigo-komedioj enhavas realajn, alegoriajn, terurismajn, absurdismajn kaj ekzistenciajn elementojn. Ili estas perfektaj specimenoj kaj de teatro nova (miksaĵo de absurdo- kaj kruelo-teatro lau ties prezentado-maniero) kaj de serioza kaj profunda teatro dank' al ekzistenciaj temoj en gi enhavataj.

La intrigo fluas senobstakle per senpera lingvaĵo, ĉiam je la servo de l'konflikto. La drama parolo, kohera kaj riĉa: -distordita, perforta, humura, alegoria, sarkasma, humana, dolĉa, kruela, eleganta, klera, popola aŭ familia-, lerte kongruas kun la diversaj personoj kaj okazaĵoj. La dialogoj harmonie interplektigas, kaj la monologoj sprucas akurate per drama forteco. Sperte, trafaj teatro-frapoj kompletiĝas tiun lingvaĵon je la fino de la intrigo.

Jen per sceno-priskribo, jen per marĝennotoj, Ruiz Negre signas zorge kaj lerte dekoracion, lumojn, vestaron, personajn agmanierojn, muzikon kaj sonon, atingante tion, ke ĉi-tiuj elementoj restu je la servo de la intrigo.

La personoj de Ruiz Negre, ja en si mem kompleksaj, disvolviĝas koncerne la familiajn kaj sociajn rilatojn ĉiam en konflikta medio. Malamo, venĝo, naŭzo, despero, timo, nesekureco, aŭ amo sindona estas sentoj ŝpruĉataj en la familiaj kaj humanaj rilatoj de tiuj personoj. Ili, socie ne sufiĉe konformigitaj, senanime egoistaj, kruelaj, eĉ iam perversaj, kapablas por vivteni sin traserĉi en rubujojn, almozpeti la ne havantajn monon au amon, kaj por atingi siajn celojn, minaci, torturi eĉ mortigi.

La alegoria portreto prezentita de Ruiz Negre en tiuj intrigo-komedioj estas morna kaj mizera. Lia teatro montras la disfalintan personecon de tiu fiaskita socio materia sen apenaŭ spiritaj valoroj, aliformiĝitaj aŭ ne bone komprenataj, tiel kiel ni vidos post la studo-analizado de tiuj tri komedioj: ***Amara dolĉaĵo, Cis la limo, kaj Pri la koro.***

Mendoj:

**Eblas mendi** ĉi tiun interesan libron, tute nemalhavebla, **pere de la retadreso**:
augustocasquero@hotmail.com
Vendoprezo: 8 eŭroj, sendokosto inkluzivita.

# Aventurplena aŭtobiografio de ĝisosta SAT-ano

Mi naskiĝis la 20-an de julio de 1928 en Brno (tiama Ĉeĥoslovakio). La gepatroj, ĉefe la patro, donis al mi mondcivitanan edukon. Tio kaŭzis, ke jam en lernejo mi opiniis la historion de la nacioj absurda, pro ĝia senĉesa militado. Tiom pli, ĉar unu el la fratoj de la patro estis ĉeĥa ŝovinisto, dum la alia germaniĝis.



Proksimiĝis la jaro 1948 kaj mi sentis, ke hipokrita propagando de komunistoj kondukas tutan landon en pereon. En tiu tempo mi estis varbata en armeon, sed obeo de tiu ĉi ordono estis kontraŭ mia konscienco. Pro tio mi kun tri amikoj decidis fuĝi. Post Plzen, mi estis haltigata de policano. Sed mi havis nekredeblan bonŝancon, ĉar li estis ege bonkora homo. Kiam mi konfidis al li mian intencon elmigri, li deziris al mi feliĉon kaj lasis min foriri. Mirakle ni ankaŭ trairis inferan pafadon inter soldatoj kaj policanoj kaj mi transpaŝis la limon al Bavario.

Tie mia peto pri plua elmigro en Aŭstralion ne estis aprobata kaj mi estis sendata en germanan *azilejon* por enmigrantoj. Tie oni varbis min al Fremdula Legio. Kiel rekruto mi senpage traveturis Germanion, sed poste mi kategorie rifuzis soldatiĝi. Estus ja absurde, ke mi, fuĝanto de la hejma soldatservo, akceptus la samon en alia lando. Mi transiris al sudfranca urbeto Creusot kaj tie en fandejo de Schneider mi trovis laboron. Tie estis bonega medio de multnacia kolektivo — mi kalkulis minimume dekkvin. Nur ĉeĥoj kondutis tie tro memfide, kion mi ne toleris kaj prefere mi amikiĝis kun hispanoj. Dum multaj monatoj mi loĝis kun ili kaj fariĝis *blonda hispano*.

En nia ĉambro ni havis junan esperantiston Sobota, el Slovakio. Antaŭ sia forveturo, li donacis al mi ***Ŝlosilon de Esperanto por ĉeĥoj***, kaj du adresojn de esperantistaj organizoj. Franco luis al mi sian montardometon izolitan en arbaro kaj tie mi komencis lerni la internacian lingvon. Helpe de la ŝlosilo, mi skribis al SAT-oficejo. Mi mendis libron ***Manifesto de la sennaciistoj***, kiu poste fariĝis mia sola lernolibro. Kompreninte ĉion, mi rememoris tion, kion rakontis al mi mia patro dum mia infanaĝo, kaj mi trovis, ke la ideoj de Lanti, fondinto de SAT, kaj tiuj de mia patro, estis preskaŭ

la samaj, kvankam la patro ne estis esperantisto. Mi esperantistiĝis kaj aliĝis al SAT en la jaro 1953.

En la sama jaro trafis min grava akcidento. Mi falis en ardan skorion kaj kun terure brulvunditaj piedoj mi aperis en malsanulejo. Tie vizitadis min nur unu maljuna alĝeriano, kiu alportadis al mi fruktojn kaj diversajn frandaĵojn el tiu malmulto, kiun li mem havis. El miaj samlandanoj neniu interesiĝis pri mi. Sed tiama ĉefkuracisto, min, ankoraŭ ne tute sanan, baldaŭ sendis hejmen, ĉar mi estis *nur eksterlandano*. Mian senesperan situacion vi ekkomprenos, kiam mi klarigos al vi, ke *hejme* estis por mi malgranda dometo, perdita ie inter arbaraj montoj. En vasta ĉirkaŭaĵo estis neniu, kiu helpus min. Tiam estis kruela vintro kaj mi ne kapablis stari sur miaj kripligitaj piedoj. Por manĝi mi havis preskaŭ nenion, nur kelkajn kubetojn da sukero, sed pro malforto, pri tio mi ne pensis. Mi nur kuŝis kaj glutis neĝon pro granda soifo kaj febro, sen fajro, sen lumo, kvazaŭ ekskomunikito de la homara komunumo. Mi ne plu havis imagon pri la tempo aŭ danĝero, ĉar mi troviĝis jam preskaŭ en agonio.

Sed foje mi malfermis la okulojn kaj mi spertis, ke denove mi kuŝas en malsanulejo. Mi estis bonŝanca. Neniam mi ŝlosis pordon. Tute hazarde trovis min homoj, anoj de Ruĝa Kruco —sanservistoj, kiuj min tien alveturigis. Post iu tempo mi resaniĝis, sed ankoraŭ unu jaron mi iradis helpe de lambastonoj.

Poste mi denove laboris, sed nur kvar horojn tage, ĉar pli multe mi ne povis pro forta doloro. Fine mi maldungiĝis kaj foriris en Parizon. Tie mi ĉiun monon fordonis al mizeruloj, kiuj dormis en kruela malvarmo ĉe la bordoj de Sejno. Trovinte loĝadon ĉe Ruĝa Kruco, mi tie restis kelkajn tagojn. Pri mia plua sorto decidis unu malpermesita cigaredo. Pro ĝia fumo oni forpelis min el la rifuĝejo kaj mi devis iri inter la faman frataron de la pariza kanajlaro. Restis al mi nur tranoktado sur ŝtuparo de metroo, kie ni, senhejmuloj, sentis almenaŭ iom da varmo aŭ kontentiĝi per *pavima dormejo* sur la bordo de Sejno. Nokte mi migris kiel multaj aliaj preter parizaj bazaroj, kie oni povus trovi de tempo al tempo frostitan frukton, legomon, aŭ peceton da forĵetita pano. Tiel mi travivis la tutan jaron. Estas vere, ke mi povis esti flegita de sennaciecaj esperantistoj, sed ne estis mia kutimo, ke mi ĝenu iun. Mi volis memstare pasi eĉ per difektitaj piedoj. Ja multaj aliaj fartis pro sia aĝo pli malbone ol mi. Juneco dum tempo ĉion flegos, mi diradis al mi.

Pli poste, mi denove sukcesis enviciĝi en normalan vivon, laborinte en aŭtofabrikoj, poste kiel murpentristo, ankaŭ en fabriko por produkti kakaon, kie mi povis tranoktadi en vestejo kaj mia sanstato pliboniĝis. Kiam mi trovis laboron kiel noktan prizorgiston en hotelo, mi povis havi liberan tempon dum la tago uzi laŭ mia plaĉo kaj mi ofte vizitadis SAT-oficejon por helpi tie kaj babili kun esperantistaj geamikoj. Tio estis por mi la plej ĝuinda periodo de mia vivo. Kun francaj E-amikoj mi neniam parolis alian lingvon, nur Esperanton.

En la jaro 1962 mi edziĝis kun francino ok jarojn pli juna ol mi, kaj en la jaro 1965 naskiĝis al ni filo Frank. En la jaro 1967 mi trasloĝiĝis en *veran ekzilon* en Ĉeĥoslovakion. Dum la jaroj mi estis observata kaj *gardata* de polico, ĉefe pro tio, ke mi havis eksterlandan edzinon, kaj ke mi kontaktis kun disidentoj. Ankaŭ mi rifuzis aliĝi al socialismaj sindikatoj, brigadlabori kaj partopreni balotojn. Longe daŭris antaŭ ol la situacio trankviliĝis.

**Adolf Vezelay**

# Bonvolu ridi..., sed ne tro!

*Estas nova, bonhumura, dissendolisto en adreso http://groups.yahoo.com/group/libertempo/, kiun oni devus viziti, se oni estas malgaja. El tie mi prenis la sekvantajn humuraĵojn.*



**Ĉe juĝejo**

Juĝisto: Do, sinjoro, kiom vi pensis, kiam vi vidis, ke viaj genajbaroj ekbatadis unu la alian?

Atestanto: Ho, sinjoro la juĝisto! Mi pensis, ke mi neniam edziĝos.

—oOo—

—Ĉu via mortinta amiko havis la kutimon paroli sola?
—Mi ne scias, S-ro Juĝisto.
—Ĉu vi ne konis vian amikon plej bone?
—Kompreneble jes, S-ro Juĝisto, sed mi neniam estis kun mia amiko, kiam li estis sola.

—oOo—

**Du vampiroj parolas:**

—Ho, kiel vi prenis tiom da sango!
—Ĉu vi vidas tiun muron?
—Jes.
—Mi ne vidis ĝin.

—oOo—

**Edzina stulteco**

Tri amikoj parolas pri siaj edzinoj dum la paŭzo de piedpilka maĉo. La unua diras:

—Mia edzino estas vere stulta: La pasintan tagon en la rabatoj, ŝi aĉetis kvar pneŭmatikojn, kaj ni ne havas aŭton!

—Mia edzino estas pli stulta— diras la dua homo, —ŝi aĉetis ok vidbendojn en la filmovendejo, kaj ni ne havas vidregistrilon!
Kaj la tria saltas:
—Mia edzino estas la plej stulta: ŝi aĉetis dek skatolojn da kondomoj por feriumi en Ibizo..., kaj ŝi ne havas kacon!

—oOo—

**Fatala recepto**

«Ĉu vi sekvis la recepton, kiun mi donis al vi?» la kuracisto demandas sian pacienton.

«Ne, sinjoro doktoro», respondas la paciento. «Se mi farintus tion, mi estus mortinta nun.»

«Ĉu mortinta? Kion vi celas diri per tio?»

«Nu», respondis la paciento, «la recepto flugis tra fenestro de la kvina etaĝo...»

—oOo—

**Stulteco**

Li estis tiom stulta, ke li studis dum 20 jaroj la manieron ne studi.



# Gazetoteko Lanti kaj *Boletín*

Ci, leganto, jam ĝuas la unuan numeron de la *Gazetoteko Lanti*. Multan laboron mi investis en tiu ĉi numero, ***Kajeroj el la Sudo***. Mi ne havis, tamen, problemojn, ĉar mi havis preskaŭ ĉiujn numerojn, kaj tiujn, kiujn mi ne havis, mi pruntepreni de samideano José María Bernabéu, kies sindonemo kaj ĝentileco estas proverbaj inter ni.


Sed por la dua volumo de nia gazetoteko, mi ne nur havas multe da laboro, sed ankaŭ multe da problemoj, ĉar mankas al mi multe da magazinoj. S-ro Bernabéu helpeme pruntedonis al mi sian kolekton, sed bedaŭrinde, laŭ la jaroj, li pruntedonis al aliaj samideanoj, kaj ili malsukcesis redoni ilin al li. Pro tio, mi de ĉi tie **alvokas** ĉiujn samideanoj kaj kamaradoj, kiuj havas ilin, ke ili sendu al mi por *virtualigo*. Mi promesas, ke mi resendos. Se, tamen, oni ne fidas min pri tio, almenaŭ fotokopiu kaj sendu al mi la fotokopion. La rezultanta virtualaĵo ne estos tiom perfekta, sed almenaŭ ekzistos.

Jen la numeroj, kiuj mankas al ni:

Jaro numeroj

1949: 4 al 7.
1950: 13 al 16, 18.
1951: 25, 27, 31.
1952: 42 al 46.
1953: 49, 51 al 57.
1954: 61, 62, al 63 mankas la enhavo, nur estas la kovrilo, 64, 65.
1955: 83, 84.
1956: mankas ĉiuj, tio estas, de la numero 85 al 96.
1959: 113, 115.
1960: 120, 121.
1961: 128.
1963; 140 al 143 (tamen mi havas numerojn 141 al 143, sed de 1964!)
1965: 151.
1966: 157.
1968: 168 estas kun difektita kovrilo.
1969: 175.
1970: 177, 178, 181, 182.
1971: 184 al 186.
1972: 192 al 194.
1973: 195, 198, 200.
1974: 201.
1975: 207, 209.

Ĉiujn aliajn de aliajn de 1949 al 1975 mi jam havas. Ŝajnas, ke ne estas problemoj, laŭ la nuna redaktoro de ***Boletín***, pri la bultenoj pli novaj ol 1975, ĉar li mem virtualigos.


FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA · VALENCIA

Núm. 1

BOLETIN

Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

NUESTRO SALUDO

Hace exactamente un año que, tras penosos esfuerzos y ansiosos anhelos, los desperdigados esperantistas españoles, restos de aquella importante grey de hace algunos años, lograron de los poderes públicos su constitución legal en sociedad. Los que, en ese tan próximo pasado, pudieron vivir el momento en que se nos comunicó tan grata nueva, no olvidarán nunca la entusiástica recepción que se le hizo; reunidos para festejar, el 15 de Diciembre, la memoria de nuestro inolvidable Fundador, llegó la noticia en el mismo momento en que, llenos de alegre camaradería, íbamos a sentarnos a la mesa. Todos los concurrentes celebraron con júbilo su conocimiento, y la fiesta tuvo, desde aquel momento, una doble significación: aquella fecha señaló un hito memorable en la historia del esperantismo español.

Quedó entonces constituída la HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO, y, gracias a ella y a los esfuerzos de un grupo de entusiastas esperantistas, se pudo dar un impulso notable a la propagación de nuestro idioma auxiliar en España.

Pero nuestro anhelo perseguía un objetivo inmediato que, dadas las dificultades del momento y nuestros escasos medios, nos parecía utópico alcanzar: una Revista, un Periódico. Apuntábamos demasiado alto; [illegible] detenía con su mármorea mano, y, ateniéndonos a ella, venimos hoy a ofrecer a los esperantistas españoles, a los socios de la H. E. F., lo único que podemos, a costa de cuantiosos esfuerzos, presentarles como lazo de fraternal unión, instrumento de propaganda y medio de perfección lingüística: el BOLETIN de la H. E. F.

Como exponente de la vida espiritual de nuestra Federación, su objetivo es bien claro: «Propagar el Esperanto, procurar el perfeccionamiento de nuestro idioma auxiliar entre los esperantistas, y lograr en España el más alto nivel posible, que nos ponga en plan decoroso con respecto a otras naciones y, llegado el momento, se pueda decir que en España se cuenta con una masa esperantista suficiente para que se pueda oficialmente implantar su estudio obligatorio, contando con un cuadro de competentes profesores, capaces de enseñarlo y difundirlo.


Al aparecer, este BOLETIN se complace en honrar la memoria del inolvidable Dr. Zamenhof, creador genial del Esperanto, y de todos aquellos que batallaron por su difusión, entre los cuales recordamos a muchísimos españoles.

Saludamos cordialmente a los antiguos esperantistas; a todos los que envejecieron en la demanda, cejando en sus esfuerzos, pero no en su ilusión; a los que, jóvenes todavía, siguen batallando por conseguir nuestro pacífico y bello ideal; a los recientes adheridos a nuestro movimiento, que desmienten con su fe la creencia de que la juventud actual sólo se deja guiar por móviles materialistas.

Por medio del ESPERANTO, llegar al corazón de todos...

EL FUNDO DE NIA KORO, KUN GRANDA FERVORO, NI DEZIRAS AL LA HISPANA ESPERANTISTARO, KAJ EKSTERLANDA KOLEGARO, MULTE DA PROSPERO DUM LA TUTA JARO 1949ª POR LA BONO DE NIA KARA LINGVO!

Jen la unua numero de ***Boletín***, aperinta en januaro de 1949.



Lanti

Se vi, legantoj, havas unu aŭ pli el la bultenoj de mi referencataj, bonvolu sendu al mi, por ke mi virtualigu. **Mi promesas, ke mi redonos al vi**. Se, tamen, vi ne fidas pri tio, vi povas sendi al mi fotokopion de la koncernaj bultenoj. La kvalito ne estos sama, sed almenaŭ la kolekton oni havos kompleta. La magazino ***Boletín*** estas fundamenta parto de la historio de Esperanto en Hispanio, kaj la gazetoteko celas fini tiun eraran situacion, ke oni ne trovas kompletan kolekton de tiu periodaĵo, kiu estas parto de la historio nia. Tuj post la kompletigo de tiu dua volumo de nia *Gazetoteko Lanti*, ĉiu esperantisto povos havi la tutan kolekton de ***Boletín*** per facila maniero, kaj preskaŭ senpage. Se ne pro hispano, pro esperantisto, oni devus havi la tutan kolekton. Ĝi helpos nin kompreni pri la malfacilaj paŝoj de Esperanto en Hispanio, kaj estas vera juvelo kaj historia kaj literara kaj esperanta.

Al anoj de HALE la dua volumo de nia gazetoteko kostos nenion. Al neano de HALE ni devas peti 15 eŭrojn, por ke ankaŭ ili subtenu nian gazetotekon, kies sidloko en Interreto ŝajne kostos monon. Tamen, de nun ĉiuj povas legi la duan volumon senpage ankaŭ, je la adreso http://www.iespana.es/esperanto/boletin.htm.

Kial mi ankoraŭ ne enretigis la unuan volumon de nia *Gazetoteko Lanti*, se ĝi ja estas ĝisdatita kaj kompleta?

La kialo estas komputila: mi ankoraŭ havas problemojn enretigi ĝin, ĉar preskaŭ ĉiu numero, kiel anoj de HALE scias de nun, okupas pli ol unu megabajto, kaj estas limo en la sidejo de niaj paĝoj, ke dosieroj ne okupu pli ol unu megabajto. Kelkaj el la numeroj de ***Boletin*** ankaŭ okupas pli ol tiu grando, sed ne estas multaj, kaj mi sukcesis dividi tiujn numerojn en du partojn. Sed pri niaj ***Kajeroj*** la problemo estas pli grava, ĉar kelkaj okupas du, eĉ ĝis kvar megabajtojn. Mi bezonas novan sidejon por la unua volumo... Sekve, kiam mi jam trovis ĝin, la tutan volumaron de nia gazetoteko migros al tiu adreso. Sed momente oni povas jam legi kaj printi la tridekok numerojn, kiujn mi jam enretigis je la adreso http://www.iespana.es/esperanto/boletin.htm. Vere estas problemo, ke mi ne havas ĉiujn numerojn de ***Boletin***, sed mi enretigas nur tiujn, kiujn mi havas. Jose María Bernabéu Franco pruntedonis al mi ĉiujn, kiujn li havas, por ke mi komencu la publikigon. Sekve, mi petas vian kunlaboradon, legantoj, se vi ankaŭ estas aŭ estis ano de HEF kaj havas tiujn numerojn, kiuj mankas al mi. La estonto dankos vin certe, kaj ankaŭ mi.

Fine de mia artikolo, mi diros, ke esperas mi, ke vi daŭre legos ***Boletín*** kaj ***Kajerojn el la Sudo*** dum la venontaj 300 numeroj, almenaŭ. ☺

Elkore,

*Jesuo*



Ridetoj antaŭ la flago de Esperanto.



La sepan de la lasta septembro superlokaj esperantistoj kunvenis apud belega marbordo, en Gvardamaro de l' Seguro, inter Alikanto kaj Mursjo. Jen kelkaj vizaĝoj tiam kaptitaj.

Venontjare ankaŭ vi venu!

# Datrevene

Tio ĉi estas speciala datreveno por nia magazino, kaj ankaŭ por nia asocio.

Multaj aferoj okazis de kiam, la 1-an de decembro de 1988, Antonjo Marko Botelja venis antaŭ vi per granda modesteco kaj iluzio. Multajn fojojn oni demandis sin ĉu temas pri la lasta numero de "Kajeroj el la Sudo".



Sed estas jam 15 jaroj venante al vi, kun nur du aŭ tri prokrastroj de la taŭga momento de apero. Nia magazino neniam havis multe da abonantoj, ĉar nia asocio estas nacia, loka kaj faka. Tamen, de kelkaj jaroj ĝi estas legata regule en Interreto de ĉirkaŭ 600 homoj dise en la mondo, kio estas multe preter la limigo de fako, loko kaj nacio, kaj tio ja komencis alvokon de nia magazino al preternaciismo, kiun mi plaĉas konsideri "sennaciismo", ĉar ne vane nia asocio estas rilatanta al SAT. Fakte SAT ŝatus, ke nia asocio estu pli bona, kaj ankaŭ ni ŝatus, ke SAT estu pli bona. Nia koncepto pri boneco estante, kompreneble, adaptiĝo al Statuto koncerna, aŭ adaptiĝo de la statuto al realo. De kelkaj jaroj aperis malfaciloj inter SAT kaj HALE, kiel ĉiuj



Omaĝito Lanti.

scias. Akraj kulpigoj aperis laste al la estraro de HALE, ĉefe al mi, sed ne pro plenumado aŭ neplenumado de niaj celoj, sed pro politikaj kialoj. Eĉ oni kreis asocion por malfaciligi aferojn al HALE, sub akuzoj pri «faŝismo», «amikeco al faŝistoj» kaj «defendo de ideoj reakciaj». Tio kaŭzis, ke kelkaj homoj forlasis HALEn, kaj ne plu subtenu nin. Sed tio vere ne gravas: HALE daŭre estas asocio kultura de esperantistoj, kies celo estas la klerigado de la laborista klaso. kion ajn oni komprenu per tio. Nun HALEanaro estas nur parto de tio, kio estis iam. La nova asocio ankaŭ ne estas multnombra, kaj se ili kaj ni estas veraj esperantistoj, ni kunlaboros; do ne gravas, ke estos du apartaj asocioj. Se ili ne estas veraj esperantistoj, sed politikuloj, kiuj parolas Esperanton, ne gravas, ĉu ni kunlaboros, ĉu ne, vere. Ambaŭkaze, ni ne renoncas al nia fosilo.

Sed laste ni komencis labori pri nia *Gazetoteko Lanti*, kies unua numeron, leganto, venas al ci kune kun ĉi tiu numero de nia magazino. Temas pri la tuta numeraro de ***Kajeroj el la Sudo***, tio estas, 60 numeroj, en formato PDF. En la akompananta disko vi ankaŭ trovos la programon, per kiu vi povos vidi nian magazinon per via komputilo. Kaj ne sole

MSATeH

Gazetoteko *Lanti*

SAT kaj ni

vidi, sed ankaŭ printi, tre eble per multe pli da kvalito ol la kopio, kiun vi nun legas. Poste, vi povos krampi la printaĵojn, kaj havi belan, tutkoloran, version de la lastaj numeroj --fakte de la lastaj tridekaj--, kaj blankonigran de la antaŭaj. Kvankam nia intenco estas disvendi la magazinon en tiu formato, la anoj de HALE --kaj sekve abonantoj niaj-- havos ĝin senpage pro memoro. Aliajn numerojn ni faros nepre en la estonto, kaj ni esperas, ke nia politiko ne ŝanĝu rigarde al PDF kaj HALEano.

Plua novaĵo ni havas pri nia *Gazetoteko Lanti*: dum ke mi ankoraŭ pretigas ĉi tiun numeron de ***Kajeroj el la Sudo***, mi jam komencis enretigi la dosierojn de ties *Dua Volumo*. Mi klarigas pri tio en la sekvanta artikolo.

NI komencas je la venonta monato novan sperton, ***Kongreson virtualan,*** kiun ni esperas, ke partorpenu ne nur HALEanoj, sed ĉiu leganto de la magazino. La nuntempo prenis al ni novan manieron esperantiĝi kaj ĝui Esperanton. La nova emo estas vaste kondiĉigita de Interreto: pro tio, ke en Interreto *ĉio estas senpaga*, de unu flanko, oni ne forlasas eĉ unu eŭron profite al Esperanto, kaj de alia, oni partoprenas multe kaj abunde. Mi memoras, kiam tipa esperantisto ne partoprenis, ne aktivis multe, tamen li aŭ ŝi subtenis tiujn, kiuj faris aferojn pro aŭ pri Esperanto. Tipa esperantisto neniam havis multe da mono, kaj jam de la tempo de Zamenhof, oni ŝparis la tutan jaron por povi ĉeesti la kongreson universalan. Tamen, plejmulto da esperantistoj eĉ tiel ne povis fari tion, sed ili abonis al magazinoj por tiel subteni ilin.

Sed hodiaŭ, en la 21-a jarcento, oni ankoraŭ kredas, ke Interreto estas senpaga, do oni abonas nenion, oni subtenas nenion, kvazaŭ aferoj venus de la aero, kaj redaktoroj de magazinoj ne devus manĝi ĉiun tagon. Sed tiuj neabonantuloj ne bremsas sin je la horo kritiki, ke magazinoj esperantistaj ne estas profesiaj, kaj havas amatoreskajn malbonaĵojn. Tio trajtigas, evidente, ankaŭ amatoreskan leganton, kies plej vulgara flanko estas tiu beba plendemo.

Ĉar okazas, ke Interreto estas tute pagata de idealistoj, kiuj preferas investi iom da mono en sideoj por esperanta paĝo, anstataŭ en alia afero, kiun oni ne bezonas, kiel bileto por futbala maĉo, por teatraĵo aŭ kantaĵo de moda aŭtoro aŭ kantisto. Kiom da neesperantaj aferoj hodiaŭa esperantisto subtenas, eĉ sciante, ke ili ne esta tiom valoraj, kiel la pago povas pensigi, dum ke multaj iniciatoj esperantaj velkas pro manko da mono? NI konsideru, ekzemple, la kazo de ***Kajeroj el la Sudo***: se anstataŭ trideko, mil personoj pagus la kotizon, ĝi povus esti bone printita en presejo, kun kelkaj paĝoj en koloro, se ne ĉiuj. Ni povus havi pli bonajn rimedojn por pretigi la magazinon, kaj ni povus eĉ dungi homojn, por faciligi la aferon, kaj fari kelkajn taskojn pli profesie.

Sed mono, estante grava, ne estas determinanta: tuta la mono de la mon-

La malnova esperantisto

do ne aperigus la magazinon, se ne estus homo, kiu redaktu ĝin. Kaj, nune, tiu kondiĉo ne mankas. Sekve, nia bulteno daŭre aperos en interreto, eĉ se tio ne estas senpaga. Leganto ŝuldos tion daŭre al abonanto.

## La nova esperantisto

La *nova esperantisto* estas interreta esperantisto senpaganta. Pro tio, li kaj ŝi ne vizitas, kutime, Universalan Kongreson. Ne temas nun pri tio, ke la esperantisto ne havas monon, sed la emon elspezi monon en Esperanton. Kial iri al kongreso rilati al aliaj homoj, kiuj parolas en Esperanto, se oni povas partopreni en dissendolistoj esperantaj, sendi retmesaĝojn al konataj esperantistoj, kaj eĉ paroli voĉe al ili per programoj kiel, ekzemple *Paltalk* (=parolo al kolego)? Ankaŭ, la kotizoj al kongresoj, ĉefe al tiuj de UEA, *estas tro altaj*, kaj *oni ne devus komerci pri tiu alta ideo, Esperanto!* Ankaŭ, oni povas vidi la esperantiston, al kiu oni parolas ĉiumomente, per rimedoj de lasta teĥnologio.




## Virtuala kongreso de HALE

Mi povas pensi pri kelkaj kialoj kongresumi aldone al uzo de tiuj modernaj iloj, sed mi ne diskutos ilin ĉi tie. La antaŭaj kialoj igis nin, fakte, organizi la Unuan Kongreson Virtualan de HALE la venontan decembron. Ĝi havos la samajn aferojn, kiujn oni trovus en personĉeesta kongreso, escepte de la pago. Unu trajto estos, ke ĝi estos senpaga. Estos prelegoj pri kaj per Esperanto, kulturaj aferoj, kantoj kaj kantigoj, ekskursoj virtualaj, disktuoj kaj Kongresa Temo. Sendube ĝi kostos monon, sed kiel kutime, nur al organizantoj. Se oni decidas subteni la kongreson, oni estos en aparta kategorio, «Patrono de la kongreso», kaj se oni de povas aŭ volas pagi, oni estos «Normala kongresanto». La liston oni jam malfermis, do se oni deziras malgrandan kongresan numeron, oni aliĝu --senpage-- tuj!

## Tria Kongreso

La kongreso, ne estos la I-a Kongreso de HALE, sed la 3-a, ĉar ni jam havis kongresojn en Lorko kaj en Mursjo. Nun la koncepto «en» malaperas de niaj kongresoj, ĉar ĉiu partoprenanto estas en hejmo sia --aŭ de amiko sia-- dum ke li aŭ ŝi partoprenas niajn kongresojn. La personajn renkontiĝojn oni ne malpermesas, kompreneble, sed ili estos, same kiel ĉiam estis en persone ĉeestantaj kongresoj, privataj aferoj. Oni ja eblos rendevui cele al bieraj aŭ eĉ pli personaj aferoj, eĉ se okaze de kongreso «virtuala», sed pro tio respondecas la partoprenantoj mem, ne la organizantoj!

Mi esperas, ke oni aliĝos amase al tiu kongreso. Se la sperto estas pozitiva, ni ripetos la kongreson en la estonton. Se ne, ni lernos multe pri la konkludoj de la malsukceso. Do, bonvolu, helpu nin partopreni kaj plibonigi la estonton de Esperanto.

# Televido: ĉu monda danĝero aŭ neŭtrala komunikilo?[1]

de Ĝuljo Kapa[1]

## STARPUNKTOJ KONTRAŬAJ

**1**

La germana filozofo Karl Raimund Popper estis unu el la gravaj pensuloj de la jarcento kaj pri scienco kaj pri socio. Politike, li pledis por malfermita socio, kaj malfidis ĉian trudon de la ŝtato en la tereno de civitanaj liberecoj. Tiom pli impresas liaj lastatempaj alvokoj por la kontrolado de televido. En intervjuo li asertis la jenon:

> *En ĉiu kampo de la socia vivo estus kaoso, se ni ne enkondukus regulojn. Kaj ne nur tion: por funkciadi, la merkato bezonas, krom regulojn, ankaŭ certan kvanton de fido, memdisciplino, kunagado. Jen kial mi revenas al mia tezo: televido havas enorman, neniam antaŭe ekzistintan povon sur la homaj mensoj. Se ni ne limigos ĝian influon, ĝi kondukos nin laŭ deklivon kontraŭan al civilizacio, antaŭ kiu ĉiaj instruistoj senpovas: fine de tiu deklivo nur troviĝas senbrida perforto.*



Verŝajne konsentas kun Popper la usona reĝisoro Oliver Stone, kies sukcesa filmo *Natural Born Killers* (Naskitaj por mortigi) bildigas junan paron, kiu vidas la realon tra la filtrilo de televida kulturo: ne hazarde ili senpripense praktikadas perforton, pafadon, ŝteladon, kaperadon, kaj ĉiujn agojn, kiujn televido montras kiel interesajn aŭ spektaklajn. La aŭtoro de la filmo estas sarkasme optimisma: fine de la verko, li montras la geheroojn feliĉaj kaj kontentaj, kaj eĉ liberaj de sia perfortemo: ili ŝanĝis sian vivon ĉar ili mortigis televidon, simbole kaj fakte, mortigante la televidan ĵurnaliston, kiu raportadis pri siaj aventuroj.

Popper vidis danĝeron en trorigardado de televido, precipe fare de infanoj. Tiurilate li antaŭparolis kaj subtenis verkon de usona psikologo, John Condry, ankaŭ li mortinta antaŭnelonge, en 1993: *Tempoŝtelisto kaj malfidela servanto*. En ĝi Condry asertas, ke dum plenkreskuloj rigardas televidon por amuziĝi kaj distri sin, infanoj male ĉerpas el ĝi informojn pri la mondo, kaj ne ĉiam kapablas distingi inter veraĵoj kaj fikcioj. Ĝi estas tempoŝtelado: dum infanoj rigardas televidon, ili reduktas la tempon dediĉitan al pluraj aktivecoj tre gravaj por sia kresko. Krome, la enhavoj de programoj kaj reklamado profunde influas sintenojn, opiniojn kaj agojn de la infanoj. Condry asertas, ke televido nur substrekas la nunon: tute ne ligas ĝin kun la pasinteco kaj futuro, ĝi preteratentas ĝuste la ligojn, la rilatojn: la kaŭzojn kaj la konsekvencojn de faktoj kaj agoj. Ĝi estas precipe reklamada rimedo, ĝi ne povas anstataŭi edukajn kaj sociinstruajn instituciojn kiel familion kaj lernejon.

**2**

Ne estas hazardo, ke ĝuste en Usono, gvida lando pri la disvolviĝo de televida kulturo, abundas literaturo kritika pri televido. La titolo de libro de Jerry Mander elokvente priskribas ĝian enhavon: *Four Arguments for the Elimination of Television* (Kvar argumentoj por la forigado de televido, 1978). Efektive la nombro de liaj plendoj multe pli grandas. Ni konsideru la plej impresajn:

— rigardado de televido havas hipnotan efikon; ĝi konsistigas sperton nova por la homaro: longedaŭra rigardado de lumfonto;

— kutime la homo rigardas nur reflektitan lumon;

[1]Ĝuljo Kapa estas ĵurnalisto, kiu laboras por la RAI (RAdiotelevido Itala), kaj li diris tiun prelegon dum la lasta Kongreso de HEF en Valensjo.

— televido ne nur propagandas konsumsocion, sed ĝi konsistigas ties esencan parton; kiel varo, ĝi perfekte harmonias kun la tuta konsuma sistemo;

— ĝi estas artefarita elemento aktiva, ne pasiva kiel domo aŭ aŭtomobilo; ĝi ne disponeblas al la homoj sed agas sur ili;

— per ĝi unu sola voĉo kaj mesaĝo povas influi samtempe senprecedencan nombron da homoj; do aro relative malgranda da personoj povas manipulacii tre grandajn homamasojn;

— televido favoras solecon kaj apartiĝon, ĝi kreas armeon de memcentraj sed egalaj konsumantoj; tio pli kaj pli malvigligas ĉe unuopuloj la kapablon kontraŭstari ĝiajn mesaĝojn;

— same kiel drogo, televido havas narkotan efikon: ĝi malpezigas la angorojn kaŭzitajn de konsumsocio;

— televido puŝas la homojn interesiĝi pri eventoj ekster ilia atingopovo; tiel ĝi favoras pasivecon, malkuraĝigas memkonsciencon kaj iniciatemon;

— kvankam ĝi foje similas al sperto, televido fakte efikas la malon: ĝi haltigas la tempon, malakrigas homan sentemon kaj febligas konsciencon; ĝi estas *malsperto*.

**3**

Ni registris jam pli ol unu aserto, ke en la nuntempa mondo televido estas precipe rimedo de reklamado. Oni foje aŭdas la sekvan argumenton: se demokratio dependas de vasta kaj multflanka informado, nu, informado mem, kiu estas tre multekosta, akiras sian financadon pere de reklamado, kiu do konsistigas la veran bazon kaj defendon de demokratio. Tiun argumenton refutas la itala psikologo Umberto Galimberti, kies rezonadon mi prunteprenas.

La ĉeesto de reklamado en televido ne limigas sin al la reklamaj spacoj, tiuj tre rapidaj kaj allogaj duonminutaj filmetoj: ĉi male substancas kaj animas, ne nur financas, informadon kaj demokration mem. Homoj vivas en mondopriskribo. Depost nia naskiĝo, ĉiu el ni lernas la sencon de tio, kio ĉirkaŭas, laŭ la priskribo de ĝi fare de la gvidantoj de nia edukado: precipe familio kaj lernejo. Televido simple daŭrigas kaj larĝigas tiun edukan rolon. Ĝi ne nepre manipulacias, trompas aŭ mensogas. Ĝi simple priskribas mondon, kiu ekzistas nur en ĝia prisribaĵo. Tio ne estas novaĵo en la historio: la vivo de la antikvuloj ja estis spegulo de la mita aŭ religia paroloj. Kio nun novas, rilatas la etendiĝon de la televida mondopriskriba parolo: ĝi nun atingas la tutan mondan socion. Antaŭe restis loko por diferencaj ideoj aŭ priskriboj, kaj ĝuste de tiuj elkreskis la historiaj novaĵoj. Nuntempe ne plu ekzistas tiuj "eksteraj lokoj", kaj la historia novaĵo, se ĝi intencos esprimi sin, mem ne povos eviti televidon.

Ankaŭ se ni persone ne kutimas rigardi televidon, ĝi estas nuntempe ĉies medio: ni lernas ĝian mondopriskribon ankaŭ per la rilatoj kun aliaj homoj, per iliaj agoj kaj valoroj. La tuta nuna mondo havas en televido sian pli kompletan priskribon.

Ni loĝas nun en komunikita mondo: antaŭe faktoj okazis kaj poste oni informis prie; en la hodiaŭa mondo, male, faktoj okazas nur por fariĝi informoj, nur por ke televido ilin montru; ĉio okazas nur cele al komunikado. Tial, ne plu eblas distingi veraĵon disde falsaĵo. Informado ne sekvas sed antaŭas la faktojn, ĉar la faktoj mem okazas por ĝi. Antaŭ tiu granda, fundamenta mensogo, indas konsideri la eventualajn mensogojn de unuopaj televidaj informistoj nur etajn malsincerecojn.

Kaj jen venas la tria interrilatita koncepto: demokratio. Laŭ demokratio, ĉiu rajtas diri sian opinion, tio estas fari sian mondopriskribon. Sed se ne plu eblas distingi la mondan realecon de ĝia televida mondopriskribaĵo, ankaŭ la ludo de opinioj en demokratio, bazita sur konsento post komparo, iĝas trompa, ĉar la decidoj ne plu baziĝas sur la realo, sed sur ĝia reklama priskribo. Esence nenio nova, konkludas Galimberti: tion mem klopodis plenumi la oratoroj en prahelenujo; sed inter ilia publiko kaj ni ekzistas grava

kvanta diferenco. Kompare kun la persvadkapablo de la antikvaj sofistoj, tiu de televido estas ekscesa, supermezura, totala.

**4**

Laŭ la heroo de la filmo *Broadcast News* (1987, reĝisoro James Brooks), personigita de la aktoro William Hurt, la sekretoj de televida ĵurnalismo estas nur du, la jenaj: sidi sur la malantaŭa bordo de sia jako kaj substreki vorton en ĉiu frazo. Gravas do ke via persono estu bona, taŭga bildo, kaj ke via parolo havu konvinkitan kaj konvinkan sonon. Resume, pli gravas ĉe televido la koloro de kravato ol la vortoj, kiujn oni diras. Ni konsideru anekdoton, kiu venas al ni ankoraŭ de Usono. Mi ĉerpis ĝin el libro, kiu ankaŭ atentigas pri la danĝeroj de televida socio. Temas pri *Amusing Ourselves to Death* (Mort-amuziĝo, 1985) de Neil Postman:

> *Eksprezidanto Richard Nixon, kiu plendis, ke li ne gajnis je la balotoj pro la mallerteco de siaj vizaĝoŝminkistoj, konsilis al senatano Edward Kennedy kion fari por kontentige alfronti balotkampanjon: maldikiĝi dekon da kilogramoj. La usona Konstitucio ne mencias tion, sed neniu dikulo hodiaŭ povus aspiri al alta politika tasko. Nek kalvulo. [...] Aferistoj komprenis pli frue ol ĉiu alia, ke la kvalito kaj utileco de siaj produktoj dependas de ilia aspekto; almenaŭ 50% de la principoj de kapitalismo, laŭditaj de Adam Smith kaj kondamnitaj de Karl Marx, valoras jam nenion. Eĉ japanoj, kies aŭtomobiloj onidire pli bonas ol la usonaj, scias, ke ekonomio similas pli mistifikaĵon ol sciencon. Tion cetere demonstras la reklama jarbuĝeto de Toyota.*

## STARPUNKTOJ FAVORAJ

**1**

Ni rigardu nun iom malantaŭen. En 1887, la sama jaro kiam Zamenhof aperigis la unuan libron de Esperanto, la usona verkisto Edward Bellamy metis la finan punkton al sia romano *Looking backward* (Rigardante malantaŭen). Temas pri utopia vizio priskribita de juna bostonano, kiu vekiĝas post pli ol jarcenta dormo en estonta Usono de la jaro 2000. Li renkontas kaj priraportas socion harmonian, riĉan, sen senlaboreco. Bellamy ankaŭ imagas serion da futurismaj inventaĵoj: elektra lumo, amasvendejoj, kreditkartoj kaj radia dissendado. Lia vertiĝa imagemo tamen ne puŝas sin ĝis la elpensado de televido. Lia heroo Julian West jam sufiĉe miregas pri tio, ke en difinita ĉambro de ĉiu domo oni povas aŭskulti muzikon ludatan de la plej kapablaj, kompetentaj kaj magiaj virtuozoj de la lando, aŭ eĉ de la mondo. Li komparas tiujn perfektajn koncertojn kun la amatoraj muzikaj posttagmezoj de li spertitaj en usonaj domsalonoj en la jaro 1887; tiam li povis aŭskulti nur bonvolemajn ete talentajn pianludantajn fraŭlinetojn. Male, en la jaro 2000 oni spertas nur la plej bonkvalitan muzikon. Ni legu kiom entuziasme kaj kortuŝe li deziris kaj profetis ion — alte fideleca radio kaj diskoj — kio por ni jam estas nur agrable memkomprenebla:

> *Ŝajnas al mi,[...] ke se ni estus sukcesintaj elpensi sistemon por provizi ĉiujn en siaj propraj hejmoj per muziko kvalite perfekta kaj kvante senlima, adaptebla al ĉia animstato, startebla kaj ĉesigebla laŭplaĉe, ni konsiderus la pinton de homa feliĉo jam atingita, kaj ĉesus strebi al pluaj plibonigoj.*
>
> *(Edward Bellamy, **Looking Backward**, ĉ. 11)*

Nur detalon preteratentas nia utopiisto: ke se radio aŭ alia magia inventaĵo alportas al ĉiu ĉambro de la mondo tion, kio estas plej ŝatata kaj dezirata de la homoj, pluraj el ili sentos fortan emon ne plu eliri el la ĉambro mem. Por ne diri pri alia kromefekto: en la 19-jarcenta antaŭradia socio malgrandaj kaj lokaj talentoj plenumis kaj ĝuis socian rolon, iliaj streboj havis kiel premion la atenton de la ĉirkaŭanta mikrosocio. Tiu varma kompenso perdiĝas, se oni devas daŭre suferi komparon kun la monde plej eminentaj konkurantoj.

Plej apartigas nin, homojn de la jaro 2003, disde la jaro 1887, la epoko de utopiistoj kiaj Edward Bellamy aŭ Ludoviko Zamenhof, la konscio ke teknika progreso ja larĝigas perspektivojn, konsentas neniam antaŭe spertitajn eblecojn, sed samtempe implicas kostojn. Ĉiel, tio ne devas igi nin forgesi, ke tiuj samaj novaĵoj, inventaĵoj, atingoj reprezentas la revojn de la homaro dum jarcentoj, eĉ dum epokoj. Kaj ke difinitaj komfortaĵoj estas nun memkompreneblaj kaj malfacile prirezigneblaj.




## 2

Por sperti nun kiamaniere oni alfrontis antikve gravajn komunikajn novaĵojn, ni legu epizodon el la dialogo Fedro de Platono. Sokrato rakontas:

*Mi do aŭdis, ke vivis iam ĉe Naŭkrato en Egiptio unu el tieaj antikvaj dioj. Ibiso estas la birdo al li konsekrita, kaj li mem nomiĝas Tot. Li inventis nombrojn kaj kalkulon, geometrion, astronomion, kaj ankaŭ triktrakon, ĵetkubojn, kaj fine kaj ĉefe li inventis ankaŭ la skribon. Tiam regis la tutan Egiption reĝo Tamus, en la granda urbo de la alta lando nomita de la Grekoj Tebo, kies dion ili nomas Amono. Tot venis al la reĝo kaj montris al li la artojn, kiujn li inventis, dirante, ke necesas ilin disvastigi inter la egipta popolo. Tiam la reĝo demandis, kia estas la utilo de ĉiu arto. Dum Tot klarigis, Tamus laŭdis aŭ mallaŭdis, depende ĉu la klarigoj ŝajnis al li bonaj aŭ malbonaj. Oni rakontas, ke plurajn aferojn Tamus rimarkis favore aŭ kontraŭe al ĉiu arto: estus tro longe ilin raporti detale. Sed kiam li venis al la skribo, —Tiu ĉi scienco, ho reĝo— diris Tot— igos la egiptojn pli kleraj kaj memoremaj, ĉar tiu ĉi rimedo favoras memorkapablon kaj sciojn.— Kaj la reĝo diris: —Ho tre inĝenia Tot, iuj kapablas naski la artojn, dum aliaj kapablas juĝi ĉu ili portos malavantaĝojn aŭ utilon al tiuj, kiuj ilin praktikos. Vi estas la patro de la literoj, kaj tiom bonvolema al ili, ke vi ĵus asertis la malon de ilia vera efiko. Ĉar ili liberigas de la strebo memori, kaj tial ili kaŭzos forgeson en la animoj de tiuj, kiuj ilin lernos. Tiuj, fidante skribadon, nur memoros pere de la eksteraj signoj, kaj ne plu per si mem, pere de ena strebo. Vi do trovis rimedon ne por fortigi la memorkapablon, sed nur por helpi memoradon. Rilate sciencon, al viaj disĉiploj vi provizas nur la ŝajnon kaj ne la realon de ĝi. Ili longe lernos el libroj kaj ne plu ricevos instruon: tial ili aspektos kiel grandaj sciuloj, sed plejparte mankos al ili juĝkapablo. Plej malagrable, ili ŝajnos kleraj, sed tiaj ne estos ili.*

Hodiaŭ ni ne povas plene konsenti kun reĝo Tamus. Ĉar cetere tiom kreskis la kvanto da sciindaj nocioj, ke per nura memoro la homo povus profiti nur tre malgrandan kvanton. Tiuj konsideroj pri skribado tamen forte similas al pluraj kritikoj, kiujn oni faras hodiaŭ kontraŭ televido. Por respondi al Platono, mi citos optimisman konsideron de Umberto Eco:

*En la historio de homaro ĉiu modifo de la kulturaj iloj prezentiĝas kiel profunda krizigo de la antaŭa kultura modelo. Por bone kompreni la realan efikon de la novaĵo, oni devas konsideri, ke la novaj iloj agos en nova kunteksto: la kunteksto de homaro mem profunde modifita kaj de*

*la kaŭzoj kiuj portis al la aperigo de la novaj iloj, kaj de la iloj mem.*

Komunikado per siaj iloj ĉiam organizis la homajn pensojn kaj forĝis sociojn. Kiam la homo loĝis en grotoj, komunikado estis vida, la bildoj regis la plej antikvajn sociojn kaj favoris pensan kaj povan sistemojn bazitajn sur magio. Voĉa komunikado ekestis samtempe kun la lingvo, kaj kun ĝi venis vorta pensado kaj parola kulturo. Skriba komunikado kreis senprecedencan akumuladon de scioj kaj ebligis la kontinuecon de la homaj streboj. La skriba esprimrimedo ofertas la plej bonan starpunkton por argumentado; ĝi disvolvas la kapablon pensi konsekvence kaj koncepte; ĝi ebligas taksi raciecon, ordon kaj kontraŭdirojn; ĝi favoras serenan prikonsideron kaj objektivecon; ĝi prenas sian tempon por decidoj, ĝi do instruas aŭskulti kaj toleri. La skriba kulturo havis solan sed gravan difekton: ĝi estis elita.

Male, la plej modernaj amaskomunikiloj etendis sendiference al ĉiuj homoj la eblecon ricevi mesaĝon, sed samtempe vekis el la pasintecon la antikvajn pensoskemojn: tiujn vidan kaj parolan.

### 3

Laŭ la franca verkisto Bernard-Henri Lévy, du grupoj da homoj troigas la povojn de televido kaj atribuas al ĝi magiajn efikojn: la politikuloj, opiniante, ke pere de televido oni gajnas aŭ malgajnas ĉe balotoj, kaj la intelektuloj, opiniante, ke la krizo de ilia socia rolo dependas de televido. Al la intelektulara plendo, ke ĉe la amaskomunikiloj la ideoj estas uzitaj, izolitaj de siaj kompleksaj naskokondiĉoj, prezentitaj per fortaj kaj krudaj formuloj, jen la respondo de Bernard-Henri Lévy:

*Se oni iras paroli en televido kun la intenco detale eksponi en dek minutoj kialojn kaj konsekvencojn de kompleksa filozofia doktrino, tiam oni ja kuras al la plej brutala missimpligo. [...] Male, se oni konsideras, ke la libra kaj aŭdvida paroloj estas heterogenaj, nur homonimoj unu de la alia, tiam malfermiĝas tuta tereno da eblecoj, tuta alfabeto, tuta sintakso, tuta serio da ĉirkaŭvojoj kaj elturniĝoj, da tropoj kaj metaforaj sistemoj, kiujn ni tute ne antaŭvidis, kaj kiuj ne apriore pli malriĉas aŭ trosimpligas ol aliaj.*

Bernard-Henri Lévy krome asertas, ke televido ne kapablas mensogi, kaj ke tion oni tre bone konstatas ĉe politikistoj. Se ili lernas mensogi, samtempe la spektantoj lernas detekti iliajn mensogojn, pro la "efekto vereco" propra de televido.

### 4

Por kompletigi la kadron de argumentoj favoraj al televido, necesas ankaŭ konsideri grandan nombron de homaj situacioj, ĉe kiuj televido ludas tre gravan kaj pozitivan rolon: ĉe lit-malsanuloj; ĉe ĉiuspecaj soluloj, ekzemple maljunuloj; ĉe homoj, kiuj loĝas en izolitaj lokoj. Reklamkampanjoj pri televido en la kvindekaj jaroj parolis pri "fenestro al la mondo": per televido oni ja montras al ni multon, kio okazas en la mondo. La rolo de televido en la preskaŭ senperforta revolucio de orienteŭropaj landoj estis tre grava. Ĝia rolo por la ĉesigo de la milito en Vjetnamo estis decida. Nia hodiaŭa koncerno por la okazaĵoj en eksa Jugoslavio ŝuldiĝas plejparte al la viveco de televidaj raportaĵoj. Ni krome ne forgesu la edukan, instruan rolon de televido, ekzemple per la dissendo de dokumentarioj pri naturo.




Recenzo

# La mitoj de la Hispana Intercivitana Milito

Pío Moa estas stranga historiisto: kiel junulo li aliĝis kaj aktivis en kontraŭleĝa politika partio, kiu fontis el plej radikala flanko de PCE (Partio Komunisma de Hispanio), kaj ili eĉ mortigis senkulpulojn pro sia ideologio, la triste fama GRAPO (Grupo Rezista Kontraŭfaŝisma Unua de Oktobro), kiu murdis pli ol 80 homojn. Post enkarceriĝo, li fakiĝis pri historio, kaj li studis la Intercivitanan Militon de Hispanio de alia vidpunkto al tiu, kiun lia politika partio instruis al li. Li iĝis, do, ribelulo kontraŭ ribeluloj, kaj li reserĉis. Liajn eltrovojn li priparolas en tiu libro, ***Los mitos de la Guerra Civil***. Interese estas, ke li senkulpigas neniun, sed tamen, li pruvas, ke mensogo kaj troigo ĉiam akompanis referencon al tiu milito, ne estante la plej malgranda tiu, pri la kvanto da ĝiaj mortintoj: ne miliono, sed nur 150 000. Evidente, tio estas tro da sango, kaj oni devintus eviti tion. Tamen, sesono da tio, kion oni priakuzas Generalon Frankon. Aldone, li notigas, ke ne estas klare, ke kulpas nur unu flanko.

Parolante pri la fama gvidanto de PSOE kaj poste Prezidanto de la Registaro, Largo Kabaljero, en paĝo 67, li citas liajn vortojn: *Konsolido de reĝimo postulas faktojn, kiuj vomigas, sed kiujn hitorio justigos... Socialismo devas veni al perforto maksimuma por forpuŝi kapitalismon.* Kaj tiu mesaĝo evidente puŝis la ribelon de 1934, kiu okazigis sangajn eventojn en 26 provincoj, sed kies plej gravaj estis en Asturio, kie la ribeluloj socialismaj venkis dum du semajnoj, devigante la respublikan registaron fari militan operacion komplikan. Je la fino de la ribelo, evidentiĝis, ke pli ol 1 400 homoj mortis, kaj estis detruitaj kelkaj centoj da konstruaĵoj, kiel preĝejoj, kulturaj domoj, la Universitato de Ovjedo, pinakotekoj, bibliotekoj, faktorioj, kaj fervojoj kaj aŭtoŝoseoj estis bojkotitaj preter uzado. Interese esta noti, ke dum ke en la ribelo de Generalo Sanĥurĥo, je 1932, partoprenis nur kelkaj dekstruloj, en tiu ribelo socialisma partoprenis preskaŭ ĉiuj maldekstraj partioj kontraŭ leĝeco desegnita de ili mem. Oni multe kritikis, ke oni me ekzekutis Generalon Sanĥurĥon, sed kiam Fronto Popola venis en povon, ĉiuj gvidantoj socialismaj estis liberigitaj, ofte, kiel en la kazo de Largo Kavaljero, *pro manko da evidento.*

La libro tuŝas multajn temojn de la milito, kvankam evidente ne ĉiujn. Oni nepre legu ĝin, se oni deziras esti bone informita pri la historio de Hispanio dum la lasta jarcento.



# NOVA LIBRO EN ESPERANTO

Okaze de la 68a Hispana Esperanto-Kongreso, okazinta en Valencio, 15a ĝis 20a de julio, oni prezentis novan verkon, en Esperanto, de Antonio Ruiz Negre, titolita "Intrigo-teatro, kiu konsistas el tri teatraĵoj: "Amara dolĉaĵo", "Cis la limo" kaj "Pri la koro", esperantigitaj de Julio Tarín kaj Santiago Miquel. La libro estas eldonita de Grupo Esperanto de Valencia.

**La aŭtoro**: ANTONIO RUIZ NEGRE

Naskita en Valencio (Hispanio) en 1938a, li debutis dum la sesa jardeko per siaj unuaj literaturaj kreaĵoj en jurnalismo kaj rakont-arto.

Li membras en la Hispana Verkista Korporacio (Asociación Colegial de Escritores de España) kaj en la Madrida Asocio de Teatro-Aŭtoroj (Asociación de Autores de Teatro), kie li okupis estrajn postenojn de 1993a gis 1998a. Klara emulo ce la scena fakto, li kreis en 1990a la Valencian Tablon de Teatro-Autoroj (Taula Valenciana d'Autors Teatrals) kiun li presidis gis 1996ª. Samtempe li apartenas al la Asocio de Verkistoj en Valencia Lingvo (Associacio d'Escritors en Llengua Valenciana).




La verko de Ruiz Negre transcendis en tiel malproksimajn regionojn de lia loĝloko, kiel Madrido, Sud-Ameriko kaj pluraj Usonaj Statoj en kies Universitatoj -Brown University Providence, Rhode Island; University of Cincinati, Ohio; kaj UCF de Orlando, Florida- lia teatro estis utiligita kiel studo-esploro en altnivelaj seminarioj.

Prolifera aŭtoro, li longe superas duoncenton da verkoj, el kiuj tridek kvin estis jam scenigitaj. Tiuj konsistas el historia dramo, amuza komedio kaj intrigo. Eble, tiu lasta genro estas la plej bone akceptata de l'publiko, ĉiam avida surprizigi. Tiele, liaj verkoj ***Li tion ne farus*** (Él no lo haría), ***Trio de fakto*** (Trío de hecho), ***Nenien*** (A ningún sitio) ***Kupra denaro*** (Un denario de cobre), ***La sepa koverto*** (El séptimo sobre), ĉiam sukcesis en scenejo kaj estas facile akireblaj en librovendejoj ĉar el lia tuta verkaro, dudek tri teatraĵoj estis jam publikigitaj. Per sia literatura laboro, Negre estis dekfoje premiita en rakont-arto, radioelsendaj skeĉoj kaj teatro-verkoj.

De la oka jardeko, Negre instruas kaj reĝisoras diversajn trupojn per kiuj li ludigis verkojn proprajn kaj alies. En ĝusta momento, li gvidis plurajn teatro-elsendojn en Radio Minuto, en Topo 40-Ĉeno kaj en Naci-Hispana Radio. Nun li administras unusemajne televidan programon en privata ĉeno de kie li diskonigas la plej freŝajn teatraĵojn de sia urbo kaj la nuntempajn aŭtorojn.

Per la trupo EFECTO 2 TEATRO, kiun Negre arigis en 1990a, li ege sukcese aŭtoris kaj prezentis dek spektakojn, tra granda parto de la hispana surfaco.

Daŭrigas je paĝo 6-a

# La Statuto de SAT

## Teksto de la KONVENCIO akceptita de la 8-a Kongreso inter SAT kaj la tiamaj LEAoj. Gotemburgo 1928

1. Konsiderante, ke la nacilingvaj Esperanto-asocioj kvazaŭ formas la rezervujonpor la tutmonda Esperanto-asocio (SAT), ĉiu laborista esperantisto klopodu, ke la interrilatoj estu la plej intimaj inter ambaŭ organizoj.

2. Ĉar la taskoj inter ambaŭ organizoj estas malsamaj, necesas, por eviti konkliktojn, ke SAT principe plenumu la taskon de peresperanta laboro, kaj la landaj asocfioj principe tiun de poresperanta laboro.




3. Per sia kooperativo, SAT eldonu ĉiujn esperantlingvan presaĵojn. La nacilingvajn presaĵojn (propagandilojn kaj instruilojn) ankaŭ kun miksita teksto, eldonu la landaj Esperanto-asocioj.

4. Por ke la efektiviĝo de tiuj proponoj povu okazi glate kaj laŭregule, ĉiu nacilingva asocio elektu dum sia kolngreso unu membron, kioes tasko estu konstante interrilati kun la SAT-estraro en la celo trovi la plej bonan solvon pri demandoj interesantaj ambaŭ organizojn. Tiu elektota peranto havu en la gvidantaro de SAT la rolon de konsulta membro. Saman rolon li ankaŭ havu en ka estraro de la sialanda Esperanto-asocio.

5. Okaze de konfliktoj decidas la *Ĝenerala Konsilantaro* de SAT komune kun la *Pli vasta estraro* de koncerna lingvo-regiona organizo. Se ĉi lastaj ne trovas kontentigan solvon, tiam solviĝu la konfliktoj en speciala kunsido de landaj reprezentantoj kune kun la gvidantaro de SAT okaze de SAT-kongreso, kaj en la eksterordinaraj okazoj findecidu referendumo inter la membraroj de SAT kaj la koncerna lingvoregiona organizo.

6. Por forigi la nuntempan ĥaoson inter la diversaj asociaj membroj, ĉiu landa asocio agu jene: en ĉiu LEA grupo ekzistu SAT-rondo, kiu plenumu la peresperantan kaj por SAT-an laboron en la kadro de la grupo: la estro de la LEA-grupo havas la devon, ĉiujare en januaro reelektigi gvidantojn de la SAT-rondo.

7. La SAT-rondo havas la taskon kolekti SAT-kotizojn, abonojn al SAT-organoj, entute plenumi ĉiujn peresperantajn kaj por SAT-ajn aferojn (enkasado de SAT-kotizoj kaj kolektado de abonoj al SAT-organoj prefere okazu pere de la subkasistoj de la LEA-grupo, kiuj fine ordigos tiujn aferojn kun komisiita SAT-ronda gvidanto aŭ kasisto).

8. La gvidanto de la SAT-rondo estu samtempe la loka peranto de SAT kaj respondeca por la peresperanta kaj SAT-a laboroj (nepre ekzistu en ĉiu grupo asntataŭanto de la peranto, pro ne interrompi abonojn aŭ ŝarĝi la LEA-grupon mem).

9. La SAT-rondo ne havu specialajn, lokajn kotizojn, sed ĉiuj aferoj estu ordigataj en la kadro de la LEA-grupo. Estas dezirinde, ke ĉiu SAT-ano estu samtempe LEA-ano. La LEA-oj devas nepre propagandi en ĉiuj eldonoj, por ke ankaŭ la LEA-anoj fariĝu SAT-anoj. Same SAT devas propagandi, ke ĉiuj SAT-anoj fariĝu LEA-anoj.

Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO Tfn° (00 34) 658 166 323

Retskribu al jesuo@ono.com

http://www.iespana.es/kajeroj.htm

http://storm.prohosting.com/jesuo

# La 3ª Kongreso de HALE estas Kongreso Virtuala

De la 1-a ĝis la 15-a de decembro vi partoprenu la 3-an kongreson de HALE de ĉiu ajn loko de la mondo!

Aliĝu (senpage) kaj informiĝu je la adreso http://www.iespana.es/Esperanto/kongreso_virtuala de nun.

Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Ankaĉus'.